

PENSEO

N-ro 318

apr. / 2018

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 29-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Paulo Silas (Brazilo)



NOVAJ TEMPOJ

Brazilo, inter la plej kruelaj,
vi elstaras kiel eminenta genocidulo.
La blanka vualo de la nuna pseŭdopaco ne
detiros
senindulgan verdikton.
La potenco kun kiu vi ekstermis
ekstermos vin dum subita bumeranga refrapo.
Via ekzisto, Brazilo, apogiĝas sur malrespekto,
trudo, rabo.
Ŝtato de granddimensiaj perfortoj
plenumitaj sub la masko de progressa marŝo.
Alproksimiĝas tempo por inversa fortopuŝo.
Via detrukapablo kapablos detruvi vin,
kiam maturiĝos la momento.
Brazilo, la insidaj insistoj de la reklama farso,
la pufa spongo de viaj komfortaj mensogoj
disŝiriĝos per trafikaj akuzoj kontraŭ via ŝajna
pleneco.
La historio ne deturnis la makabran vizaĝon.
Ĝi rigardas rekte,
kun okuloj kiuj postulas samgrandan
renverson.
Tribunalo malfermas siajn pordojn
por juĝi ĉiujn kulpajn generaciojn.
La subtена bruo kaj la kunsenta silento
same ne povos prezenti alibion.
La morto ne likvidis la kulpon.
La pasinteco ricevos nenioman pardonon.
Via grandeco amikas kun la majesto de
monumentoj
starigitaj surbaze de ekspluato.

Venas nun via horo.
Kuntekste kun tutmonda tendenco, ĝi najbaras.
Albordiĝas la perejo.
Reduktiĝas al polvo
ĉiuj simboloj de regnestraj orgojloj.
La popoloj reĵetas la sceptran legitimecon,
rifuzas sin rekoni en la rezultoj de la
murdentrepenoj.
Piramidoj, obeliskoj, temploj, kasteloj kun
remparoj,
statuoj, skulptaĵoj kaj surŝtonaj skriboj
malintegriĝas, malkomponiĝas,
dispeĉigas per la ago de vandaloj
senkulpigitaj de miljara ŝuldo,
envicigotaj en herogalerioj de venontaj
epokoj.

Tiberio Madonna (Italujo)



TAGO DE PRINTEMPO

La floroj
elmontras fiere
siajn vestetojn
multkolorajn;
la folioj
verdigate de l' suno
spuguliĝas
en la tapiŝo el herbo densa;
la floketoj
de l' leontodo
flirtas en l' aero
kiel blankaj paraŝutoj;
la suno
radia
kombas en la ĉielo
siajn longajn harojn blondajn

kiuj karesas
 la nubojn lanecajn;
 la birdoj
 aŭdigas inter-branĉe
 noton post noto
 la tutan partituron
 de siaj riĉaj polifonioj
 dum la frondoj
 aplaŭdas
 vizitate de la brizo.
 En la tepido
 de l' posttagmezo
 la printempo kontentigita
 sin lulas.

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Fremda



Mi ne plu identiĝas kun la knabino sur la foto,
 nek kun la figuro, kiun mi nun vidas en la
 spegulo.

Sento pri ne apartenado min turmentas;
 ŝajnas, ke mi paŝas en la intertempo:
 pasinteco estas memoro, kiu lante foriĝas;
 estonteco fariĝos maltrankvileco nur.

Juiz de Fora, 25/02/2018.

Kalendaro 2018

L' animo ne havas aĝon;
 ĉe histori' ĝi sidiĝas
 por jardekojn liberigi:
 en hasta flugo balonojn
 al la fundo de l' memoro.

Oraj jaroj, la kvindekaj,

sentelevida infanaĝo;
 la sesdekaj plonĝis tute
 en nian kontraŭkulturon.

La sepdekajn, jen spiono
 ĉe la universitato
 por frekventi niajn klasojn
 pri lingv' kaj literatur'.

La okdekajn, geedzeco:
 unuan fojon patrino;
 en la naŭdekaj, vidvino ...

En la jaro du mil tri,
 l' alvoko de Esperanto
 por flugi kun geamikoj,
 per la balon' de l' espero,
 laŭ la senfina direkto.

Juiz de Fora, 19/03/2018.

Hans-Georg Kaiser (Germanujo)



Ne forgesu nin

Foje supre, foje sube,
 ŝvebas mia sprit' en blu'.
 Ĉu balone aŭ ĉe-rube,
 min ne kaptas la enu'.

Tra la park' mi iras lante
 pro la nuboj en ĉiel'.
 En kvieto kaj verkante,
 gvidas min plezura cel'.

En la tagoj, en nokthoroj
 pensas mi pri la belec',
 pri scienco kaj furoroj,
 pri magia eternec'.

Tamen vivas mi surtere,
 foje trafas min sufer'.
 Sed mi strebas plu sincere
 kaj al amo kaj al ver'.

Kun estim' kaj malestimo

vivas mi en nia mond',
dum labor' sen iluzioj,
kvazaŭ kiel mara ond'.

Min vivtenas ina ĉarmo,
kaj mi miras plu kaj plu,
ke brakum' kaj ina varmo
serenigas min sen bru'.

Vivojaroj laŭ folioj
falas for de vi kaj mi.
Mi ne plendas plu al dioj,
preskaŭ mankas sentebri'.

La plej multaj homoj fias
en la aĉa monodram',
sed pro vi mi ĉiam scias,

ke ekzistas dec' kaj am'.

Se mi iam devos morti,
jen kun kis' de vi, edzin'.
Se mi devos eksenvorti,
tenu vi permane min.

En la tomb' mi petos pacon,
birdokantojn eĉ por ni,
por babiloj erinacon,
sed vizitojn ja de vi.

Steloj supre kiel oro
brilu hele sen instru'.
Kaj vi hejme jam en foro
dormu pace sen enu'.

Mori (Usono)



AFORISMe(30)

Kie ajn regas
justa leĝo,
tie ĉiu homo
estas reĝo.

Homo kun prudento
vivas plene,
senzorge,
en la momento.

Politikisto povas esti
kaj lupo
kaj vulpo
sen sento de
bedaŭro kaj kulpo.

Malgrandanimaj etmensuloj
sur la altaj postenoj
estas fieraj kiel leonoj
sed kondutas kiel hienoj.

Idiotoj suferantaj

sub la botoj de despotoj
mem parte respondecas
pri siaj malfeliĉaj sortoj.

Ĉiam kaj ĉie ekzistas
homfiguraj animaloj
kiuj estas pretaj
por la plej teruraj krimoj
kaj bataloj.

Doloro
kiun oni suferas
mute
pli grandas ol doloro
pri kiu oni krias
laŭte.

Je la fino de tago
ĉiu homo respondecas
pri siaj faro kaj ago.

Tie, kie spiras
saĝaj patriotoj
ne povas longe vivi
kruelaj despotoj.

Ne ĉiu animalo
estas sentima leono
nek ĉiu homo estas
grandanima persono.

Neniam
forgesu manon
kiu donis al vi
panon.

Bonfarto de la fiŝo
dependas
de tiu de la maro,
bonfarto de la homo
dependas de tiu de
la tuta homaro.

Politikistoj
nome de popolo
zorgas pri
sia propra volo.

Politikisto
kiu mallerte
ludas politikon
devas ĉiutage
ludi piedpilkon.

***	sur la tero.	sovaĝaj animaloj kaj bestoj
Kie riĉaj politikistoj	***	kondutas pli afable
zorgas nur pri riĉuloj	Sen la lumo de	ol certaj homoj
la cetero de popolo	plumo	en elegantaj vestoj.
parte vivas kiel	homaro vivas en	***
sklavlaborantaj muloj	mallumo.	Malantaŭ
kaj parte kiel	***	tro bona propono
sangosuĉantaj kuloj.	Kiam oni kondutas	ofte estas kaŝita
***	kiel konsciataj civitanoj	fripono.
Kiam oni respektas vin	tuj ekfala tiranoj.	***
pro via mono	***	Malantaŭ
aŭposteno	Batalo kaj milito	ĉiu tiel nomataj
oni ja ne havas respekton	per pafilo kaj bombo	sanktaj bataloj
por vi	nome de homa digno	kuŝas homvizaĝaj
kiel persono.	kaj paco	diabloj.
***	esta sgranda trompo.	***
Aglo kuraĝa flugas	***	Militoj kaj bataloj
super la nuboj	Grandas la diferenco	estas ŝatataj aferoj
kaj homo saĝa flugas	inter homo kies koro	de certaj politikistoj,
super la duboj.	doloras pro sufero	generaloj kaj diabloj.
***	de malfeliĉa persono	***
Paco,	kaj homo kies koro	Sen liberanima
libero,	batas por	karaktero
justo,	pli kaj pli da mono.	ne eblas vivi
kaj prospero	***	en libero.
estas urĝaj aferoj	Nuntempe	

Wally du Temple (Kanado)



Atendo Por Maristo

Marrefluoj dum miljaroj
konturis ŝtorme, plaŭde
ŝtonajn trajtojn sur la klifojn
facetis krutapike.

Marondoj dum sola horo
skizis granitan mienon
Al molsulka invizaĝo
Gravuris fortakve ŝajnon

PAPOS Nascentes (Brazilo)



Kuzo kaj kuzino

1

dezirojn kiu forigas ĉu kuzo kuzino?
deziro de gekuzoj sin esprimu – aŭ ne rimu.
deziro de gekuzoj – familio gape ĝin forigu!
etere gestas esto-partiklo: ne min punu!

2

ĉu tial tioma streĉo kaj perfido?
malnecesas kiu min punu: mia rimo mia spir'
poezias mia esto:
idas mi el kuzokuŝanta kuzin':
kaj mi mem kia restas?

3

per tono kaj naturdoto kvietiĝas mia anim'
 agordas min – min moderigas
 Silento rimas kun Dia: malakcepto familia?
 tim'?' sekret'?' frenezaĵ'?'
 gepatroj – panjo nur knabin', paĉjo ankoraŭ
 knab'
 ĉu panjo lulas min? min forpelas? knabece
 ludas paĉjo?
 Este sentemp-space jen nun mi
 atentoplene meditas:
 metafizika ekvido min memoras: ne plu kuzo,
 kuzin',
 sed Tria Inkluzivita: amiko, rigardu min.

Minosun (Ĉinujo)



Amo

Knabino bonstata kaj bela,
 Preskaŭ deksexjara, anĝela,
 En vesperkrepusko ŝi staris,
 La florojn printempajn nun flaris -
 Ĉe l' domo estis persikarbo.
 Plie, bonodoris pajlgarbo.
 En lune blanketa ĉemizo
 Ŝi revis ebrie, en brizo.

Junulo, konanta ŝin iom
 supraĵe, kiu loĝis tiom
 Proksime al domo fraŭlina,
 Nun iris, ho, al ŝi, fascina.
 Kun kor' animita, kviete
 Li haltis kaj... diris diskrete:
 "Ho, ankaŭ vi estas ĉi tie!"
 Ŝi perdis sin kvazaŭ, nu, ie:
 Saluton ŝi ne reciprokis.
 Neniel li al si arogis
 Plu diri. Tiele, silente
 Disiĝis du homoj, turmente.

Kaj poste ŝi estis krulele
 Trompita: Perfidis gangstere

Ŝia fiparenco en vendo
 De ŝi aliloken por cento
 Da spesoĵ. Kaj tie vendiĝis
 Ŝi foje, refoje, sed kriĉis
 Ŝi vane. Kiel kromedzino,
 L' ulino, sub prema destino,
 Post la aventuroj teruraj,
 Oldiĝis, kaj tiam plezuraj
 Memoroj ŝin tenis vivsuka:
 Vesperon en vento lanuga,
 Printempa, sub arbo persika,
 Junulo foriras amika...

Inter miriadoj da homoj
 Terglobaj kaj el milionoj
 Da jaroj, dum kiuj malĝojo
 Kaj ĝojo alternas sur vojo,
 Vi tiun knabinon renkontis!
 Sed ho ve! nur tuŝe vi sondis,
 Subtile kaj melankolie:
 "Ho, ankaŭ vi estas ĉi tie!"

Adaptita laŭ la prozo AMO de Eileen Chang

Eileen Chang (1920-1995)



Amo

Tio estas vera.

Estis bela knabino, kiu devenis el bonstata familio en malgranda vilaĝo. Multaj venis ŝin svati, sed neniu el ili sukcesis. Tiutempe ŝi aĝis nur dekkvin aŭ deksex jarojn. Iun vesperon de printempo ŝi staris ĉe la posta pordo, sin apogante per la mano je la persikarbo. Ŝi memoris, ke ŝi portis ĉemizon lune blankan. Transe loĝis junulo, kiu konis ŝin nur laŭaspekte, sed neniam faris saluton al ŝi. Tiam li alvenis. Ne malproksime de ŝi li haltis, kaj milde elbuŝigis: "Ho, ankaŭ vi estas ĉi tie?" Ŝi ne respondis, kaj li diris nenion plu. Post momento ili disiĝis.

Tiel tio finiĝis.

Poste tiu knabino trompiĝis. Ŝia parenco vendis ŝin kiel kromedzinon al iu en alia gubernio, kaj tie ŝi estis denove transvendita kelkafoje. Post sennombraj aventuroj, kiam ŝi maljuniĝis, ŝi ankoraŭ rememoris la renkontiĝon. Ofte ŝi menciis tiun vesperon, la persikarbon ĉe la posta pordo, kaj la junulon. Inter miriadoj da homoj el la senlima, tempa sovaĝejo, kie vegetas milionoj kaj milionoj da jaroj, vi renkontis kiun vi deziras, ĝuste tiam, ne pli frue, nek malpli frue je unu paŝo, kaj tamen vi havis nenion pli por diri, ol subtile saluti: “Ho, ankaŭ vi estas ĉi tie?”

Elĉinigi **Minosun (Ĉinujo)**

Esperanto-programo de kastelo Greziljono en 2018

2018-apr-20/28 » PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun

Przemek, Christophe, Marion » rete gresillon.org/p

2018-apr-27/28 » PRINTEMPaS, internaciaj

KER-ekzamenoj » rete gresillon.org/p

2018-maj-09/13 » Ĥora (korusa) renkonto de Interkant' kun

Zdravka Bojĉeva » rete gresillon.org/koruso

2018-maj-09/13 » ReVe, Renkontiĝo Vegana, kun prelegoj,

kursoj, filmoj, koncerto de Jonny M » rete gresillon.org/reve

Somera programo 2018 » rete gresillon.org/somero

2018-jul-09/27 » Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj

kun Perla Mielo, Louis Jeuland, Nina Danylyuk, Mikaelo

Bronŝtejn

2018-jul-09/16 » Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj

Esperanto-kurso » rete gresillon.org/s1

2018-jul-15/21 » Semajno de ĉiĉeronado en la regiono

Anĵuo kun Catherine Kremer » rete gresillon.org/s0

2018-jul-16/21 » Speciala semajno kun kursoj de

Esperanto kaj de la franca lingvo » rete gresillon.org/s2

2018-jul-21/27 » Internacia E-Konferenco de OSIEK

"Esperanto en Artoj" » rete gresillon.org/s3

2018-aŭg-11/19 » Festa Semajno por infanoj kaj familioj »

rete gresillon.org/s4

2018-okt-26/nov-03 » AŬTUNE la Esperanto-ferioj - kun

halovena festo kun Dennis Keefe

Esperanto-Kulturdomo et kastelo Greziljono

kontakto: kastelo@gresillon.org

telefono: +33-2.41.89.10.34

Du Fu (712-770)

Vilaĝa Nokto

Vaste kreskas prujnaj herboj,
Noktinssektoj ĉirpas morne.
Sude, norde de l' vilaĝo
Hombruoj silentas dorme

Mi eliras sola stari
por rigardi antaŭ heĝo:
En lunlumo fagopiraj
Floroj brilas kiel neĝo.

elĉinigi **Minosun (Ĉinujo)**

Li Bai (701-762)

Demando kaj respondo pri la monta vivo

Al la demando kial mi loĝas ermite sur monto.
Mi ridete kun trankvila koro ne respondas.
Dum falintaj persikfloroj kun la akvo silente
forfluas.
Mi spertas la apartan paradizon for de homa
konfuzo.

elĉinigi



Abengo (Ĉinujo)

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)



Glaso malplenaj.
Trinkis mi amarvinon.
Ploro de l' gitar'.



La palaj fingroj
jen sorĉadas la klavojn.
Ŝekspira sonet'.

*
 Manplatoj tremas.
 La ŝtono ekparolis.
 Ĝemo en silent’.

*
 Vojeto blanka.
 Frostotremas nudmerloj.
 Kameo ... kaj Ŝi.

Iir Zhiti



NUR MOMENTETO

Nur momenteto,
 nur momenteto,
 limigas nenion,
 disde miraklo.

Nur momenteto,
 nur momenteto,
 donas nin abismon,
 aŭ feliĉecon.

Nur momenteto,
 nur momenteto,
 dividas iluzion,
 disde la vero.

Nur momenteto,
 nur momenteto,
 disigas morton,
 disde la vivo.

Nur momenteto,
 nur momenteto,
 dividas militon,
 disde la paco.

Nur momenteton,
 nur momenteton,
 distancas perdo,
 disde la profito.

Nur momenteto,
 nur momenteto,
 dividas sukceson,
 disde simpla revo.

Nur momenteto,
 nur momenteto,
 estos ni pro
 momenteto viktimo
 Tirana, julie, 2017

Tradukis



Bardhyl Selimi

(Albanio)

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKTRIA

La Taŭo de la ĉielo

§13-02

Iam la reĝo Shun demandis la reĝon Yao,
 dirante:

“Kiel vi, reĝo elektita de la Ĉielo, uzas
 vian menson?”

La reĝo Yao respondis:

“Mi ne estas aroganta kontraŭ la
 senhelpaj, mi neniam forlasas la malriĉajn; mi
 funebras pri la mortintaj, mi amas la infanojn
 kaj mi simpatias kun la virinoj. Jen kiel mi
 uzas mian menson.”

“Vi estas sufiĉe bona,” diris la reĝo Shun,

“sed ne granda.”

“Kion do mi devus fari?” demandis la reĝo Yao.

“Tiu, kiu posedas la ĉielan virton en sia menso,” respondis la reĝo Shun, “ĉiam restas en la paco. Lia influo manifestiĝas tiel nature, kiel la suno kaj la luno verŝantaj sian lumon en la ĉielo, kiel la kvar sezonoj alternantaj en sia propra ordo, kiel la tago kaj la nokto regule sin sekvantaj, kaj kiel la nuboj elsendantaj pluvon.”

“Kiel profunde mi dronas en mondecaj aferoj! Vi konformigas vin al la natura evoluo de la estaĵoj, dum mi konformigas min nur al la homaj aferoj.”

La ĉielo kaj la tero estis konsiderataj de la antikvuloj kiel la kriterio de la grandeco. Ili estis admirataj de Flava Imperiestro, la reĝo Yao kaj la reĝo Shun. Jen kial la antikvaj suverenoj prenis nur ilin kiel sian modelon.

§13-03

Konfuceo volis iri okcidenten kaj deponi siajn skribaĵojn en la reĝa biblioteko de la dinastio Zhou. Zilu, unu el liaj disĉiploj, donis sian proponon:

“Mi aŭdis pri iu emerita bibliotekisto tiea, kiu estas nomata Laŭzi. Se vi volas konfidi viajn skribaĵojn al la biblioteko, kial vi ne turnas vin al li por helpo?”

“Tio estas bona ideo,” diris Konfuceo.

Li iris vidi Laŭzi, kiu tamen rifuzis doni helpon. Konfuceo do penis persvadi lin prezentante siajn ideojn entenatajn en siaj dek du klasikaĵoj.

“Tio, kion vi diras, estas tro longaj kaj tedaj. Mi volus aŭdi la esencon,” diris Laŭzi, lin interrompante.

“La esenco kuŝas en la humaneco kaj la justeco,” diris Konfuceo.

“Ĉu mi povus demandi: ĉu la humaneco kaj la justeco apartenas al la homa denaska naturo?” demandis Laŭzi.

“Jes,” respondis Konfuceo. “La noblulo ne povas atingi sukceson en sia kariero sen la

humaneco kaj ne povas vivi en la mondo sen la justeco. La humaneco kaj la justeco ja estas parto de la homa denaska naturo. Kion do ni povus fari sen ili?”

“Ĉu mi povus demandi: kio do estas la humaneco kaj la justeco laŭ vi?” demandis Laŭzi.

“Dividi en la koro la ĝojon kun ĉiuj estaĵoj kaj ami egale ĉiujn homojn sen egoismo estas la esencaj ecoj de la humaneco kaj la justeco,” respondis Konfuceo.

“Aĥ! Kiel hipokrita estas tio, kion vi ĵus diris! Ĉu la amo universala ne estas tro pedanta? La malegoismo fakte estas egoismo. Ĉu vi esperas, ke la tuta mondo perdos sian propran naturon? Dank’ al sia propra naturo, la ĉielo kaj la tero havas siajn konstantajn leĝojn, la suno kaj luno estas lumaj, la steloj kaj la konstelacioj estas orde aranĝitaj, la birdoj kaj la kvarpieduloj vivas en aroj, kaj la arboj kaj la arbustoj kreskas vertikale. Se vi prenas kiel modelon la ĉielan virton kaj sekvi la Taŭon, vi atingos la perfektecon de la vivo. Kial vi rekomendas la humanecon kaj la justecon kun tiel grandaj penoj, kvazaŭ vi serĉus forkurantan infanon? Ho, vi ja perturbas la homan denaskan naturon!”

elĉinigris



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Ne ŝercu per via vivo

el la rakontoj pri Afanti
—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
Juĝisto

rajde sur ĉeval'
jen renkontis Afanti
revenantan de bazar'
kun porviva var'.

Salutis
li riverence
kaj diris: "Kien iras
via moŝto intence?
Ne konfidence?"

La juĝist'
diris fiere:
"Ha, al la paradizon!
Ĉu vi iros espere
kun mi prefere?"
Afanti
diris decide:
"Ho, ne, eĉ se mi volus.
Vi mem iru rapide
ne nur rajd-side."

"Pro kio?"
Afanti al li
diris: "Ja via moŝto
forĝesis, ke iam vi
konsilis al mi

ke homoj
malbonojn faras
ĉiame kaj Alaho
kontraŭ ili jen staras,
punojn ne ŝparas.



Ja pri vi



mi maltrankvile
zorgas, ĉar, se renkontos
vin Alaho alire,
kaj laŭaspire,

do kio
okazos vere?
Nu, ne ŝercu per vivo
via nekonsidere,
ha, tre danĝere!"

Miriĉ Jadranka (Serbujo)



Martoŝanĝoj

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
Jen, tondras
el malproksime.
Ve, inoj formetantaj
tolaĵon. Tondras ritme.
Ekfulmas time.

Aperas
suno. Retondras.
Ĉi-foje ĉiel' klaras.
Tuj pluv' gutoj saltetas.
Sur marĉo dancas.

Sekvantan
tagon varme sun'
brilis. Birdoj flugantaj
alten krias. Pala lun'
aperanta nun.

Infanoj
demetas ŝalojn.
Gaje saltas en marĉojn
ŝprucante flanken ulojn.
Flugas balonoj.

Noktiĝis.
Flaviĝis Luno
dukate. Brilas steloj
ĝis maten'. Pala pruno

naskiĝas Suno.

Adiaŭ neĝo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Verdiĝas
printempa bildo.
Aero odoras je
frua printempa mildo.
Skribas sur ŝildo.

Subita
vetero-ŝanĝo. Ve
ekneĝis. Branĉar' brilas.
Blankaj ĉapeloj ĉie,
benitaj pie.

Ekfloris
krokusoj.
Adiaŭ Neĝo Homo.
Bonvenon al printempaj
tagoj. Sun' plenaj.

Ĉielo
lazure klara.
infanaj krio eĥas.
jen,du balono para.
Kiso salut', kara.!

Bluiĝas
balonoj alte.
unuiĝas kun ĉiel'.
Kuras leporo salte.
Tra herbej' halte.



Gajo (Ĉinujo)



Ĉie Feliĉo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Feliĉo
estas en tio,
ke vi kaj la karuloj
sanas en bon-medio
kaj melodio!

Feliĉo
kuŝas en tio,
ke l' infanoj ĝojkrie
ludas en harmonio,
sen apatio!

Feliĉo
venas el tio,
ke l' edzino jam olda
murmuradas je chio,
sed sen krio.


Feliĉo
kreskas el tio,
ke legas Esperante
fablojn vi en hobio
kaj kun kor-pio!

Feliĉo
nestas en tio,
ke vi kaj kunulino
kuniras por nenio,
ja sen ansio.

Feliĉo
fontas el tio,
ke vi ĉiam kontentas
kaj plendas pri nenio,
ridas al ĉio!

*Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Ĥristina Kozlovska (Ukrainio)



Fabelo pri Jetio

La vilaĝanoj vivis timante ekde kiam ili memoris sin. Nek tage, nek nokte ili havis trankvilecon. Trafis iliajn sortojn peza elprovo - la najbareco kun terura besto. Nokte ili enlitiĝas kaj preĝas por ke la nokto pasu en trankvilo, por ke ne pereu ili en siaj hejmoj de la gigantaj unĝohavaj kruroj. Ili ellitiĝas matene kaj dankas Dion pro tio, ke ili povis ekvidi ankoraŭ unu sunleviĝon, kaj denove al sia laboro, por labori en timo. Ĉiuj vilaĝanoj, junaj kaj maljunaj, ĉiam sciis, ke la Jetio, tiu monstro kaj tiu kruela besto loĝas en ilia arbaro. Neniu sciis, de kie ĝi venis, kiel ĝi trafis en ilian landon, sed ili ĉiuj certis, ke la diablo mem sendis ĝin al ili. Neniu kaj neniam vidis ĝin, sed ĉiuj sciis, ke ĝi estas granda, vila, dentoza kaj kruela. Neniu vidis ĝin manĝanta, sed ĉiuj sciis, ke ĝi manĝas vivantajn estaĵojn kaj trinkas sangon. Ne sciis la vilaĝanoj, por kio ili ricevis tiun punon, kaj sciis nur unu aferon - ili devas toleri kuraĝe, devas porti sian krucon. Forpeli la Jetion de la arbaro la vilaĝanoj eĉ ne provis, sciante, ke ili ne sukcesos, ne provis veneni ĝin, sciante, ke ne ekzistas veneno, kiu ĝin damaĝus. Sed kion oni diru pri la batalo, se al la arbaro la vilaĝanoj eĉ ne proksimiĝis, ili timis eĉ la aspekton de la arbaro, timis la sonojn, venantaj de tie, timis la venton, blovanta de tiu flanko. La vilaĝanoj delonge forgesis, kiel promenadi en la arbaro, ĉasadi tie.

Foje kelkaj vilaĝanoj vidis rompitaĵojn de arboj kreskantaj proksime al la fenestroj de iliaj domoj kaj grandajn spurojn sub la fenestroj. La homoj stuporiĝis pro la timo, imagante, ke la monstro estas enrigardanta iliajn ĉambrojn nokte, ke ĝi estas observanta iliajn dormantajn infanojn,

akrigante siajn ungegojn.

Kaj iom pli poste la vilaĝanoj trovis kelkajn mortigitajn vilaĝajn hundojn. Ili kuŝis, elŝovinte la langojn kaj elorbitiginte la okulojn, glaciigintaj pro la timo. La sango de iliaj rompitaĵoj estis disŝprucigita en la neĝo plurajn metrojn ĉirkaŭe. La homoj krucosignis sin, teruriĝis kaj rigardis direkte al la arbaro. Iliaj lipoj apenaŭ moviĝis, dirante sensone malbenojn, malbenojn por la Jetio.

Nun ĉiam pli ofte la vilaĝanoj aŭdis kraketon de arboj en la arbaro, kaj matene ili trovis amason da rompitaĵoj proksime de la vilaĝo. La besto furiozas, koleras, - komprenis la vilaĝanoj. Famo disvastiĝis inter homoj, ke ĝi intencas ataki la vilaĝon, do ĝi montras sian forton al ĉiuj.

La homoj decidis finfine konstrui grandan barilon por protekti sin kontraŭ la terura Jetio. Ĉiuj eklaboris akorde, kaj post kelkaj tagoj la barilo estis preta. Ĉiuj ekspiris malstreĉe kaj ne sentime disiris al siaj hejmoj.

La Jetio sidis en la kaverno kaj maĉis radiketojn sekigitajn pasintjare, larvoj gutis sur ĝiajn grandajn vilajn kaj iomete mallertajn kruojn. Hieraŭ nokte, ĝi, kiel kutime, iris en la vilaĝon por promeni, sed puŝiĝis kontraŭ alta kaj fortika barilo. Evidentiĝas, ke homoj ne plu volas, ke ĝi venu al ili por helpi ilin. La Jetio estis tro sentema por ignori tion. Kial? - la Jetio demandis sin, kial? - ĝi ripetis denove, sed li tamen ne povis kompreni la logikon de la vilaĝanoj. Li faris tiom da bono por ili, ĝi provis helpi kiel ĝi povis. Ĝi disbatis ĉiujn rabiajn hundojn, kiuj vagis tra la vilaĝo kaj povis ataki homajn infanojn kaj ankaŭ plenkreskulojn. Preskaŭ ĉiunokte ĝi rompis sekajn arbojn kaj kunmetis jam rompitan lignaĵon proksime al la vilaĝo por ke homoj matene povu preni ĉion tion kiel hejtlignaĵo. Neniu lupu nun eĉ proksimiĝis al la vilaĝo, sciante, ke ĝi, la Jetio, loĝas en la arbaro, kaj ke ĝi protektas tiun vilaĝon. Eble homoj ne ŝatis la fakton, ke kelkfoje nokte la Jetio iris al

la vilaĝo kaj vagis tra la stratoj, kelkfoje eĉ rigardante tra la fenestroj? Sed ĝi ĉiam penis fari tion kiel eble plej malbrue, por ne vekti iun, ne maktrankviligi. Kiam li observadis homojn tra la fenestroj, ŝajnis ke ĝia soleco malaperas ien kaj ne turmentas ĝin tiel forte. Ĉu ĝi ofendis iun aŭ ŝtelis ion de iu? Ĝi ĉiam manĝis nur herbojn, pinglajn domojn kaj strobilojn, kaj trinkis nur akvon el la plej proksima fonto. La Jetio kolektis siajn havaĵojn kaj klininte la kapon iris, kien okuloj rigardis por serĉi novan hejmon.

Matene la vilaĝanoj vekigis pro strangaj sonoj. Ekstere ekfuriozis malbona vetero, la vento muĝis. Sed inter la akra fajfado de la vento aŭdiĝis io alia. Fiksaŭskultinte la homoj komprenis, ke tio estis lupa hurlado. Lupoj, kiuj ne venadis al la vilaĝo dum multaj jaroj, estis nun rigardantaj homajn hejmojn tra la fendoj de ilia barilo.



pentrita de Oleh Loburak

Elukrainigis



Petro Palivoda

(Ukrainio)



NOVAJ ESPERANTAJ LIBROJ DE JULIAN MODEST

En monato marto 2018 aperos kelkaj novaj libroj de la konata Esperanto-verkisto Julian Modest, kiujn oni povas mendi de la libroservo de UEA.

"Dancanta kun ŝarkoj" - originala novelaro, eld.:

Dokumenta Esperanto-Centro,

Kroatio, redaktoro: Josip Pleadin.



La libro enhavas originalajn Esperantajn novelojn, verkitaj de Julian Modest dum la lastaj du jaroj.

"Averto pri murdo" - originala krimromano, eld.:

Eldonejo "Espero", Peter Balaz, Slovakio



Damjan Donev, talenta inĝeniero, fraŭlo, subite malaperas, sen postlasi signon. Lia poŝtelefono ĉesas funkcii. Lia nevo, Bojan, estas ŝokita kaj petas la privatan detektivon Janko Sinapov ekscii kio okazis

al la onklo. Post longaj kaj streĉaj esploroj la detektivo komprenas, ke iuj planas murdi la inĝenieron kaj tial li kaŝas sin. Tamen kiu aŭ kiuj deziras murdi Donev kaj kial?

"Murdo en la parko" - originala krimromano, eld.:

Eldonjeo "Libero", Lode van de Velde, Belgio.



En plua vespero en parko, proksime al ŝia hejmo, estas mortpafita la juna ĵurnalistino Maria Kirilova. La murdo, tute nekomprenebla kaj mistera vekas plurajn demandojn. La ĵurnalistino

ne havis malamikojn. La polica komisaro Pavel Silikov komencas pridemandi konatojn kaj kolegojn de Maria por trovi la murdiston, sed subite la polico trovas murditan Dako Penev, la murdisto de Maria. La mistero pligrandiĝas. Kial Maria estis pafmurdita kaj kiu deziris ŝian morton?



Eldonas Redakcio de **Penseo**

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto, Chongqing, 400023, Ĉinio

Tel: (023) 67095890 (hejme)

Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elferno.cn/penlisto.htm

